paralele: ekskurso programo en Stuttgart 13 - 16 majo 1997

celas al la plikonatigo de la klera forto de nia movado. Ni montros, ke ni ne nur okupiĝas pri ni mem kaj ke ni ne perdiĝas en la revo pri iu "fina venko", sed ke ni estas kapablaj prezenti ion, kio estas ĝenerale utila por la socio.

La junuloj diskutos kun fakuloj kaj politikistoj (ne-Esperantistaj) en laborgrupoj, ellaboros proponojn por la politikistaro el la vidpunkto de junuloj el oriento kaj okcidento kaj prezentos tiujn rezultojn en formo de "parlamento", kies debatojn povos sekvi la publiko. Por tiu aranĝo aperis aparta aliĝilo kaj dua bulteno.

PROVIZORA PROGRAMO

sabato: ekspozicioj, libromarkato, pacludoj, internacia bankulturo, vespere koncerto de Kajto dimanĉo: ekumena diservo, literaturaj prelegoj, kontraŭrasisma seminario, popolaj dancoj, pupteatro, Internet, diskuto pri internaciaj familioj, vespere teatro

lundo: literatura promeno, prelegoj - i.a. Vieno: kulturponto inter okcidento kaj oriento, vespere: komuna grilostado kaj koncerto de Jomart kaj Nataŝa el Kazal stano

mardo: mallongaj programeroj, fermo de la festivalo, libera tempo en Aalen; transporto de partoprenantoj de la Eŭropa Junulara Parlamento al Stuttgart merkredo: tuttaga transporta ekskurso de Aalien al Stuttgart, tra Schwabisch Hall, alveno en Stuttgart ĉ. 20.00 h.

ĵaŭdo: tuttagaj ekskursoj al Tübingen/Hohenzollern, Heidelberg aŭ Nigra Arbaro vendredo: duontagaj ekskursoj, i.a. Ludwigsburg, Daimler-muzeo, ŝtata galerio, urbogvidado; vespere: interkona vespero de la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso

sabato: solena malfermo, prelega enkonduko en la strukturojn de Eŭropa Unio, prelegoj de fakuloj kaj politikistoj kun diskutoj, fakgrupaj kunvenoj, ekskursoj; vespere: bufedo

dimanĉo: podia diskuto pri "Edukado en pligrandiĝanta Eŭropo" kun politikistoj, fakuloj kaj Esperantistoj, fakgrupoj, membrokunvenoj de naciaj asocioj, ekskursoj

lundo: fina debato de la kongresaj rezultoj, solena fermo

TUTTAGAJ EKSKURSOJ

La sekvantaj ekskursoj vi devas antaŭmendi kaj antaŭpagi ĝis la 15a de marto 1997. Laŭ la nombro de aliĝintoj kaj pagintoj je tiu dato ni decidus, ĉu la ekskurso okazos. Post tiu dato vi povas ankoraŭ aliĝi, sed ni ne plu povas garantii lokon.

Transporta ekskurso de Aalen al Stuttgart (El)

Por tiuj, kiuj partoprenas kaj la kulturfestivalon en Aalen kaj la aranĝojn en Stuttgart estas organizata tuttaga busekskurso de Aalen al Stuttgart. La vojaĝo kondukos vin tra la valo de la rivero "Kocher" en la belan malnovan urbon Schwabisch Hall, kie vi promenetos tra mezepoko, renesanco kaj baroko, gvidate de ĉiĉeronino (handikapuloj, kiuj ne bone kapablas malsupreniri ŝtupojn aŭ pavimitan straton bv. sin anonci).

Post tagmanĝo en historia gastejo en pejzaĝa muzeo ni daŭrigos la vojon al la pitoreska urbeto

Langenburg kun kastelo el la 13a jarcento situanta sur pinto de monteto, de kie vi havos imponan rondrigardon. Post ebleco por rigardo de la kastelo, de la roz-ĝardeno aŭ de aŭtomobilkolekto kaj post kafumado vi ree enbusiĝos por atingi Stuttgart.
foriro de Aalen: merkr., 14a de majo, 9.00 h de antaŭ la Torhaŭs (urba biblioteko)
alveno en Stuttgart: d. 19.00 h
kostoj: 1.145 BF

Heidelberg (E2)

Ni veturos tra la valo de la rivero Neckar, rigardos en la belegan pejzaĝon desur la kastelo Dilsberg kaj atingos la mondfaman urbon Heidelberg. Vi estos sur la spuroj de dekoj da famuloj, kiuj dum la pasintaj 7 jc. studis en ĝia universitato kaj kiuj neniam en ilia vivo forgesis la unikan atmosferon. Ni vizitos la kastelon kaj vi havos multe da tempo por trairi la urbon.

Revoje al Stuttgart ni ankoraŭ haltos en la kuraĉloko Bad Wimpfen.

foriro: jaŭde, 15a de majo, 9.00 h de la aŭtobusa parkejo rande de la ĉefstacidomo
reveno: d. 20.00 h.

kostoj: 1.620 8F inkl. enirbileto en Heidelberg, sen tagmanĝo

Nigra Arbaro (E 3)

Ni veturos al la orienta parto de la Nigra Arbaro, vizitos la kuracurbon Freudenstadt, traveturos la Nigran Arbaron okcidenten ĝis la deklivo al la Rejn-valo, veturos sur la vinstrato de Baden kaj sur supra panorama strato. Vi ĝuos tiun montaran pejzaĝon, unu el la plej ŝatataj kaj konataj turismaj celoj en Germanio.

foriro: jaŭde, 15a de majo, 9.00 h de la aŭtobusa parkejo rande de la ĉefstacidomo
reveno: d. 20.00 h.

kostoj: 1.230 BF inkl. tagmanĝon (bv. indiki du vi estas vegetarano)

Tübingen kaj Hohenzollern (E4)

En Tübingen, unu el la plej malnovaj kaj plej konataj universitataj urboj en Germanio, belaj trabfak-konstruaĵoj dominas la mezepokan urbocentron. La influo de la universitato kaj de la vigla studenta vivo estas nepretervideblaj kaj kontribuas al la ĉarmo de la urbo, kiu pitoreske situas surborde de la rivero Neckar.

La kastelo Hohenzollern estas majstra verko kaj de la militista kaj de la civila arkitekturo de la 19a jarcento. Sed ne nur la konstruaĵo mem estas tre vidinda, ankaŭ la kolekto de arte kaj historie valoraj objektoj en ĝiaj pompaj salonoj kaj en la trezorejo allogas multajn spektantojn. La imperiestro Wilhelm II. opiniis, ke jam la panoramo de la ĉirkaŭa pejzaĝo valoras la vojaĝon.

foriro: 15a de majo, 9.00 h de la aŭtobusa parkejo rande de la ĉefstacidomo reveno: d. 19.00 h.

kostoj: 810 BF (sen tagmanĝo)

DUONTAGAJ EKSKURSOJ

Antaŭ kaj dum la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazos diversaj duontagaj ekskursoj en Stuttgart kaj la ĉirkaŭo. Dum la kongreso ili estas aparte interesaj por akompanantoj.

Antaŭmendo ne necesas, vi povas decidi surloke kaj spontanee, ĉu vi volas partopreni kaj vi pagos dum la ekskurso.

Urbogvidado

La du kaj duonhora urbogvidado en aŭtobuso celas la plej elstarajn vidindaĵojn de Stuttgart el

historio, kulturo, politiko kaj sporto. De la mondunia televidturo (217 m) vi havos belegan rigardon sur la urbo, cirkaŭaĵo, vinbergĝardenoj, arbaro... Ekskurso taŭgas por handikapuloj.
foriro: vendr., 16a kaj sab., 17a de majo 13.00 h de antaŭ la kongresejo reveno: ĉ. 15.30 h
kostoj: 520 BF (inkl. enirbileto)

Historia Stuttgart

Pieda urbogvidado, kiu celas la historiajn vidindaĵojn de la malnova urbo. Vi renkontos kun la iama princa kaj la civila Stuttgart.

foriro: sab., 17a de majo, 14.00 h

reveno: c. 16.00 h

kostoj: senpaga, sed limigita nombro de partoprenantoj

Kastelo Ludwigsburg kaj ĝardeno "Floranta Baroko"

En Ludwigsburg troviĝas la plej granda baroka kastelo de Germanio. Duko Eberhard Ludwig de Württemberg komencis ĝin konstrui en 1704, lia nepo Carl Eŭgen finis kaj reĝo Friedriĉ de Württemberg modifis ĝin parte en klasikisma stilo. La parko antaŭ la kastelo estas nun fabelĝardeno kun multaj fabelfiguroj, neforgesebla por infanoj.

foriro: vendr., 16a de majo, 13.30 h de antaŭ la kongresejo

reveno: ĉ. 18.00 h

kostoj: transporto per publika trafiko + eniro por kastelo kaj ĝardeno sume ĉ. 395 8F

Fabrika de Daimler-Benz

En la urbeto Sindelfingen apud Stuttgart estas produktataj la aŭtoj de DaimlerBenz, i.a. la fama Mercedes. Vi havos la eblecon rigardi la fabrikon kaj vidi kiel estiĝas tiu konata aŭto.

foriro: vendr., 16a de majo, 14.00 h

reveno: ĉ. 18.00 h

kostoj: ĉ. 210 BF

Mercedes-Benz-Muzeo

En la muzeo vi renkontas la teknikan progreson de hieraŭ kaj de hodiaŭ. Tie, kie oni inventis antaŭ 100 jaroj la aŭtomobilon, batas la pulso de historio. Proks. 100 Mercedes-aŭtomobiloj kaj aliaj ekspoziciaĵoj samkiel la granda filmteatro vivigas ĝin.

foriro: vendr., 16a de majo, 14.00 h kaj sab., 17a de majo, 14.00 h de antaŭ la kongresejo

reveno: ĉ. 16.30 h

kostoj: transporto per publika trafiko (ĉ. 125 BF), eniro senkosta

Stata galerio

La plej fama muzeo de la urbo konsistas el du partoj: la malnova parto, kiu entenas pentraĵojn de la mezepoko ĝis la 19a jarcento kaj la nova parto, konstruita en postmoderna stilo en 1984 de la fama angla arkitekto James Stirling. Tiu parto estas mem artaĵo kaj ege vidinda.

En la malnova parto videblas i.a. granda altaro de la pentristo Jorg Ratgeb, kiu estis ekzekutita post kamparana ribelo en 1526. Inter la malnova kaj la nova partoj oni vidas pentraĵociklon pri Pereŭs de la angla pentristo Burne Jones kaj en la nova parto estas i.a. la environmento "nasko" de Edward Kienholz.

foriro: sab., 17a de majo, 14.00 h kaj dim., 18a de majo, 14.00 h de antaŭ la kongresejo

reveno: ĉ. 18.00 h

kostoj: eniro 105 BF

Muzeo Lowentor

En tiu paleontologia muzeo vi vidos plejparte fosiliojn el la t.n. Ŝvaba Ĵuraso. Famaj estas la trovitaĵoj de amonitoj kaj marlilioj. Same interesa estas la kolekto de sukcenajoj.

foriro: vendr., 16a de majo, 9.30 h de antaŭ la kongresejo

reveno: ĉ. 12.00 h

kostoj: transporto per publika trafiko kaj eniro ĉ. 220 BF

Panorama migrado

Stuttgart situas en tre bela valo, kadrita de vinkultivejoj kaj parkoj. Ni veturos trame ĝis certa alteco kaj de tie promenos tra belaj urbopartoj kun multaj pitoreskaj rigardoj.

foriro: dim., 18a de majo, 9.30 h kaj 14.00 h de antaŭ la kongresejo reveno: ĉ. 12.30 resp. ĉ. 17.00

Tübingen

Por tiuj, kiuj ne povis partopreni la tutagan ekskurson al Tübingen kaj kastelo Hohenzollern, jen la alternativo. Per trajno oni veturos al Tübingen kaj rigardos tiun pitoreskan universitatan urbeton. Inter la 75.000 enloĝantoj vivas ĉ. 25.000 studentoj, kiuj forte karakterizas la urban vivon.

foriro: dim., 18a de majo, 12.45 h de antaŭ la kongresejo

reveno: ĉ. 18.30 h

kostoj: ĉ. 630 BF por transporto per publika trafiko

BUFEDO

Ni tre invitas vin veni sabate vespere al rustika landtipa restoracio, kiu situas en malnova tradiciricha bierfarejo. Tie atendas vin bonega ŝvaba kaj internacia bufedo (ankaŭ vegetara). La prezo inkludas muzikan teamon kaj malgrandan surprizon. La posta balo estos libera por ĉiuj. Prezo: 46 GM; por junuloj kaj B-landanoj (vd. aliĝkotizan parton de la mendilo): 29 GM. Nepre antaŭmendu!

BILETO POR PUBLIKA TRAFIKO Per tri-taga bileto vi rajtas uzi ĉian lokan publikan trafikon dum tri tagoj. Vi ricevos ĝin antaŭ via alveno letere (12 GM).

Speciala oferto:

MISS SAIGON

Drama muzikalo, kiu temas pri amo dum la tumultoj je la fino de la milito en Vjetnamio en 1975. Teknike kaj artiste belega aranĝo, eĉ helikoptero sursceniĝas... Unua prezento en 1989 en Londono, Broadwaypremiero en 1991, ekde 1994 ankaŭ en Stuttgart.

okazos: dim., 18a de majo, 15a - 17a h

foriro: 14a h de antaŭ la kongresejo

kostoj:

kategorio I 180.- GM, kategorio II 140.- GM, kategorio III 100.GM; 50 %-a rabato por studentoj, leantoj, inoj pli ol 62-jaraj kaj viroj pli ol 65; antaŭmendoj eblas nur tiel longe, kiel restas biletoj

La Loĝiga Servo de la LKK elektis la plej favorajn hotelojn laŭ prezo kaj situo. Parte ili donis grandan rabaton por la kongresanoj. Tamen la kapaciton ni povas teni rezervata nur ĝis la 15a de marto. Bv. aliĝi kaj mendi antaŭ tiu dato (validas la dato de alveno de la mendo ĉe la LKK). Post tiu dato mendo eblas nur kontraŭ krompago de 50 GM, post la 6a de majo 100 GM. Post la 15a de marto ni ankaŭ ne plu povas garantii la indikitajn hotelojn kaj prezojn. Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, gravas frua mendo. Tamen ni ne povas garantii, ke la mendo ĉiam estas plenumbla. Pro tio bv. indiki alternativan deziron sur la mendilo. Pri la kostoj por tranoktado de infanoj bv. demandi ĉe la LKK en Stuttgart.

LOGADO EN AALEN

Kategorio 1

Tre komfortaj ĉambroj kun necesejo, duŝo aŭ banejo, telefono, televidilo kaj hotela video, minibaro. Tre riĉa matenmanĝo bufedo, propra etaĝo por nefumantoj. Situas rande de la urbo ĉe la termobanejo. 1-lita ĉ. 145 GM, loko en 2-lita ĉ. 105 GM.

Kategorioj 2a kaj 2b

Meze en la centro. Tristela komforto: ĉambroj kun necesejo, duŝo aŭ banejo, telefono, televidilo, minibaro. Matenmanĝo bufedo. 2b iomete pli kvalita ol 2a, sed malmultaj parklokoj por aŭtoj, ĉe 2a sufiĉe da. 2b taŭga por rulseĝoj, apartaj ĉambroj por nefumantoj. 1-lita ĉ. 80 GM, loko en 2-lita ĉ. 61 GM.

Kategorioj 3a kaj 3b

Diversaj pensionoj meze en la centro. "Familiara" komforto en simplaj ĉambroj, duŝoj plejparte sur la etaĝo. Riĉa matenmanĝo (3a) resp. matenmanĝo bufedo (3b). 1-lita ĉ. 52 GM, loko en 2-lita ĉ. 47 GM.

Junulargastejo

4-6-litaj ĉambroj kun matenmanĝo. Oni kunportu tolajojn (ne dormosakojn!), alikaze la pruntepreno kostos 5,50 aldona. La domo ĉiunokte fermiĝas je la 23.45 h (akurate), alkoholkonsumo kaj fumado malpermesataj. 20 GM (junuloj ĝis 26), 25 GM (aliaj)

LOGADO EN STUTTGART

Klarigo de la kategorioj

Por pli bona superrigardo antaŭ ĉiu hotelo estas kategoriindikoj. La unua litero klarigas la prezkatégorion (A = plej alta, E = plej malalta), la dua litero priskribas la kvaliton de la hotelo (A = plej komforta, G = plej simpla), la unua cifero priskribas la distancon de la kongresejo (1 = tute apuda, 5 = sufiĉe for). La finaj du ciferoj estas la kuranta nombro.

A-A-2-01 Inter-Continental

En la urba centro, vidalvide al la kastela ĝardeno, iom for de la kongresejo (ĉ. 25 min. piede). Luksega hotelo de la plej alta kategorio, ĉiu ĉambro kun telefono, televidilo, video, radio, mini-baro, ĉambroj por nefumantoj, perfekta servado. Loko en 2-lita ĉ. 140 GM (normalaj prezoj 265 - 498 GM)

A-A-1-02 Hotel im Schloagarten

Luksega hotelo, iom pli proksima al la kongresejo ol Inter-Continental (12 min. piede). Ĉambroj kun telefono, televidilo, mini-baro, harsekigilo ktp. Tre rekomendinda. 1-lita C. 200 GM, loko en 2-lita ĉ. 120 GM (normalaj prezoj 255 - 480 GM).

A-A-1-03 Maritim

La hotelo "Maritim" situas en la koro de la urbo. Piede vi atingas la kongresejon en malpli ol ses minutoj. La hotelo estas luksega, elegante ekipitaj ĉambroj kun banejo, duŝo, necesejo, radio, televidilo, mini-baro, telefono. Bonega matenmanĝo (bufedo), libera uzado de la enhotela naĝejo, saŭno kaj vaporbano. Nur haveblas dulitaj ĉambroj. 1-lita ĉ. 190 GM, loko en 2-lita ĉ. 120 GM (normala prezo 225 GM)

A-B-1-04 Hotel Unger

Komforta hotelo en la urba centro kaj en la proksimeco de la kongresejo (10 min. piede). Ĉiuj ĉambroj havas duŝon, necesejon, mini-baron, televidilon, radion kaj telefonon. 1-lita ĉ. 180 GM, loko en 2-lita ĉ. 115 GM.

B-B-2-05 Hotel Ketterer

Silenta kaj centra situo, 15 min. for de la kongresejo (piede). Komfortaj ĉambroj kun duŝo, necesejo, televidilo, harsekigilo, telefono, fakso, radio, mini-baro. Granda matenmanĝo bufedo. 1-lita ĉ. 145 GM, loko en 2-lita ĉ. 102 GM.

B-B-2-06 Kronen-Hotel

Bonega hotelo en la proksimeco de la kongresejo. Ĉiuj ĉambroj kun banejo/ duŝo, necesejo, telefono, televido. Senkosta uzo de la hotela saŭno kaj vaporbano. Riĉa matenmanĝa bufedo. Tiu-ĉi hotelo disponas nur pri tre malmultaj dulitaj ĉambroj, ĝi specialiĝis en la kategorio de unulitaj ĉambroj kun tre interesaj prezoj. 1-lita ĉ. 95 GM, loko en 2-lita ĉ. 90 GM.

B-B-2-07 Hotel Royal

Silenta kaj centra situo (en flanka strato, sed tamen tute centre), malmultaj paŝoj al la piediranta zono kaj ĉ. 15 min. piede al la kongresejo. Komforta hotelo, la kvalito de la ĉambroj plenumas la plej altajn postulojn. (Ĉiuj ĉambroj havas duŝon, necesejon, telefonon, televidilon. Bonega kuirejo. 1-lita-ĉ. 110 GM, loko en 2-lita ĉ. 85 GM.

B-B-1-08 Hotel Wartburg

Tre proksima al la kongresejo (ĉ. 3 min. piede). Luksa kaj bona hotelo, ĉambroj kun duŝo, necesejo, telefono, televidilo, mini-baro. Propra parkejo. 1-lita ĉ. 110 GM, loko en 2-lita ĉ. 85 GM.

C-C-2-09 Hansa-Hotel

Situas nur ĉ. 20 min. piede de la kongresejo. Bonaj kaj renovigitaj komfortaj ĉambroj ekipitaj per duŝo, necesejo, televidilo, minibaro, telefono. Matene vi povas ĝui matenmanĝan bufedon. 1-lita ĉ. 80 GM, loko en 2-lita ĉ. 65 GM

C-C-3-11 IB-Gästehaus

Bona hotelo kun bone ekipitaj ĉambroj. Ĝi situas en la urba centro (ĉ. 15 min. per urba trajno de la kongresejo). La ĉambroj disponas pri duŝo, necesejo, televidilo, mini-baro. Propra parkejo. 1-lita ĉ. 75 GM, loko en 2-lita ĉ. 57 GM.

D-D-1-12 Alte Mira / Museumstube

La hoteloj plej proksimaj al la kongresejo. Ambaŭ disponas pri entute 45 litoj, do ne tre multaj - vi rapide mendu lokon tie-ĉi. Laŭ komforto nur kategorio D, tamen bonaj hoteloj. La ĉambroj ne havas necesejon kaj nur kelkaj duŝon. Ĉiuj ĉambroj kun fluanta varma kaj malvarma akvo, necesejo kaj duŝo sur la respektiva etaĝo. 1-lita ĉ. 67, kun duŝo 75 GM, loko en 2-lita ĉ. 57, kun duŝo 65 GM, loko en 3-lita ĉ. 52, k. duŝo 60 GM

D-BC-5-13 Comfort Inn

Bonega hotelo ĉe la rando de Stuttgart en silenta situo. Iom for de la kongresejo (trame ĉ. 25 min.), komforto estas tre bona, ĉiuj ĉambroj kun duŝo/necesejo, harsekigilo, telefono kaj fakso. Riĉa matenmanĝa bufedo. Vespere vi povas ĝui meksikan aŭ ĉinan restoraciojn. 1-lita ĉ. 95 GM, loko en 2-lita ĉ. 52 GM.

D-BC-5-14 Viva-Hotel

Nepre rekomendinda pro plej bona rilato inter prezo kaj kvalito - se tramveturo ne estas problemo por vi. Bonega hotelo ĉe la rando de Stuttgart en silenta situo (trame 25 [min. al](#) kongresejo). Ĉambroj kun duŝo, necesejo, telefono. Riĉa matenmanĝa bufedo. Vespere vi povas ĝui italan restoracion. 1-lita ĉ. 75 GM, loko en 2-lita ĉ. 46 GM

E-F-2-15 Junulargastejo

En la junulargastejo, kiu situas en la urbocentro, ni rezervis kelkajn lokojn por 28 GM persono/nokto. Oni kunportu tolajojn (ne dormosakojn!), alikaze la pruntepreno kostos 5,50 aldone. Tiu oferto validas nur inter la 12a kaj 16a de majo, dum la kongreso bedaŭrinde ne estas liberaj lokoj.

E-G-4-16 Tramper-Point

Ci tie vi povas tranokti tre malmultekoste. Nokto/persono inkluzive de matenmanĝo kostas nur 19 GM por junloj. Personoj pli aĝaj ol 30 krompagas 5 GM. Per tramo 20 [min. al](#) kongresejo.

ĜENERALAJ INFORMOJ

mendoj

La LKK faros ĉian eblan por plenumi la mendojn. Se tio ne eblas, ĝi faros al la aliĝinto alternativan proponon. Tamen la LKK ne respondecas pri neatenditaj okazaĵoj, kiuj malebligas iun mendon.

malmendoj

Malmendo de hoteloj repagota sumo: plena pago minus

ĝis la 15/02/1997 10% (min. 25 GM)

ĝis la 1/04/1997 20% (min. 50 GM)

ĝis la 15/04/1997 45% (min. 50 GM)

ĝis la 22/04/1997 55 % (min. 50 GM)

ĝis la 05/05/1997 65 % (min. 50 GM)

poste 80 % (min. 50 GM)

Validas la dato de la alveno de la malmendo en la LKK-oficejo.

Malmendo de ekskursoj kun plena rericevo de la pagita sumo (minus 10 %, min. 10 GM) eblas ĝis la 15a de marto. Post tiu dato la pagita sumo estos repagata nur, se la ekskurso tial ne fariĝos deficitita.

pagoj kaj pagmanieroj

Mendoj validas nur post ricevo de la pago.

pere de Flandra Esperanto-Ligo; sendu la mendilon al FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen

konfirmiloj

Almenaŭ unu monaton antaŭ la kongreso vi ricevos konfirmon pri via loĝado kaj la menditaj ekskursoj kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravajoj.

reklamanoncoj en la kongreslibro

Por anoncoj en la kongreslibro la 15a de aprilo estas la limdato. La kostoj estas: 300.- GM por tuta paĝo, 150 GM por duona paĝo, 75.- GM por kvarona paĝo. Movadaj instancoj ricevas 50%-an rabaton. Varbintoj de nemovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%.

disdonado de informiloj

Se vi volas, ke la organizantoj de la kongreso disdonu vian varbilon kune kun la dokumentujo, kiun ricevas ĉiuj kongresanoj, tiu servo kostas 200.- GM, movadaj instancoj ricevas rabaton de 50%.

salonmendoj, informbudoj

Ĉiuj fakaj asocioj, sed ankaŭ unuopuloj povas mendi salonon. Normala salono por ĉ. 30-40 personoj kostas 50.- GM por unu horo. Mendoj eblas ĝis la 15a de aprilo kaj validas nur post la antaŭpago. Malmendo eblas ĝis la sama dato.

informbudoj povas esti starigitaj post antaŭa anonco kaj mendo. La LKK provizos la lokon. La prezo estas 20.- GM por unu m2 kaj unu tago.

En la tuta kongresejo krom en la libroservo la vendado de libroj estas malpermesata.

libroservo

Dum la tuta kongreso funkcias libroservo, kun kiu la kongreso havas apartan kontrakton. Pro tio neniu alia rajtas vendi librojn en la kongresejo.

asekuro

La kongreskotizo ne inkluzivas asekuron kontraŭ akcidento aŭ malsano de aliĝinto dum la kongreso. La kotizo ankaŭ ne enhavas asekuron kontraŭ kostoj pro malmendo.

korespondado

Pri ĉiu ajn demando, (mal-)mendo, aŭ reklamacio bv kontakti la LKK-n.

LKK: Esperanto Stuttgart, Daçtlerstr. 21,

D-70499 Stuttgart, tel. 0711/138 89 80, faks. 0711/138 89 82.

UTILAJ INFORMOJ

Kongresejo en Stuttgart: Haüs der Wirtschaft, Willi-Bleicher-Str. 19, 70174 Stuttgart, Tel. 0711/123-2500. Por korespondado kaj mendoj bv. uzi nur la adreson der la LKK: Dachtlerstr. 21, 70499 Stuttgart, Te1.0711/138 89 80, faks. 0711 / 138 89 82.

Alveno al Stuttgart: Stuttgart estas atingebla per aviadilo, trajno aŭ aŭto. La internacia flughaveno Eçterdingen situas ĉ. 30 min. per urba trajno de la kongresejo (linio S 2 aŭ S 3 ĝis "Stadtmitte").

La ĉefa fervoja stacidomo (Hauptbahnhof) situas ĉ. 600 m de la kongresejo. Vi povas aŭ iri piede: ĉ. 500 m laŭ la strato Königstrasse, kie vi turnas dekstren post la librovendejo Wittwer. Tie vi trauros substratan tunelon por piedirantoj al Willi-Bleicher-Strasse kaj jam vi staros antaŭ la kongresejo. Por alveni de la stacidomo vi ankaŭ povas uzi la tramon: per linioj S 1 aŭ S6, eliru jam la venontan stacion (Stadtmitte).

Se vi alvenas per aŭto sur aŭtoŝoseo (Autobahn) el la direkto de Karlsruhe aŭ Svisio, eliru ĉe la eliro Degerloch sur la straton B 27; el direkto München, eliru ĉe Vaihingen, sur straton B 14; el direkto de Heilbronn, eliru ĉe Zuffenhausen, sur straton B 10 / B 27. Ĉiam direktiĝu al la urbocentro

Akcepto de la kongresanoj funkcios en la ĉefstacidomo.

Alveno al Aalen: Aalen estas atingebla per trajno aŭ auto kaj pere de la flughaveno en Stuttgart. Per aŭto vi veturu laŭ la stratoj B 19, B29, B 290 aŭ la autoŝoseo A7 (Ulm-Wiirzburg). En la urbo estas verdaj vojmontriloj "Hotel-Route", kiuj gvidas vin al la hoteloj. Kiu deziras akompanon de la stacidomo al la tranoktejo bv. anonci tion frue.

Akcepto de la festivalanoj funkcios vendrede posttagmeze/vespere kaj sabate matene en la urba biblioteko (Torhaus), Gmiinderstr. 9. Tie vi ankaŭ trovos permanentan anonctabulon.

Monŝanĝo: Eblas ŝanĝi monon ĉe la fluĝaveno kaj ĉe la stacidomo ankaŭ dum semajnfino kaj festotago. Plie ekzistas ŝanĝaŭtomatoj diversloke. Vetero: Meze de majo la vetero en Stuttgart povas esti ankoraŭ tre ŝanĝiĝema. La maksimumaj temperaturoj povas atingi ĉ. 25°C, la

minimumaj temperaturoj estas ĉ. 8°C. En Aaien la temperaturoj kutime estas 3 - 5°C pli malaltaj.

Lingvoj: germana; sed atentu, ke la plimulto de la homoj parolas ŝvaban dialekton; se vi volas uzi la angian turnu vin prefere al junaj homoj, sed ne atendu vastajn konojn

Tempo: mezeŭropa: somere 2 horojn antaŭ UTC.

Telefono: landkodo por Germanio: 49, prefikso por Stuttgart (0) 711, por Aaien (0) 7361.

Medikamentoj: Se vi uzas preskribitan medikamenton, bv. kunporti la kuracistan recepton en la latina.

ALGEMENE LEDENVERGADERING

Op zaterdag 22 februari 1997 om 14.00 u. heeft in het Esperantohuis, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, de Algemene Ledenvergadering van de Vlaamse Esperantobond plaats. Op de dagorde staan de bespreking en eventuele goedkeuring van het werkingsverslag en van het financieel verslag, en van de verkiezing van de nieuwe Raad van Beheer.

Onmiddellijk daarna vergadert de Raad van Beheer om een nieuw bestuur te kiezen. Leden die niet behoren tot de Raad van Beheer, mogen op deze verkiezing aanwezig zijn. Zij hebben echter géén stemrecht. Alle huidige bestuursleden zijn opnieuw kandidaat, nieuwe kandidaten moeten zich vooraf schriftelijk bij de secretaris aanmelden.

Na de verkiezing volgt een tweede Algemene Vergadering met als thema: De nieuwe decreten i.v.m. subsidiëring door de dienst Volksontwikkeling. Informatie, gedragslijnen, vragen, overleg over mogelijke diensten aan andere culturele organisaties, enz.
